



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

unuiĝo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 50 Frankoj. (7,62 Euroj) Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

REPRISE DES ACTIVITES

Tous les clubs espérantistes ont repris leurs activités durant le 4ème trimestre de l'année. Les vacances ont été la période propice pour l'organisation des grands congrès, des stages et de toutes autres manifestations internationales. Ces rencontres mondiales ont été l'occasion pour échanger des idées, faire connaissance avec des étrangers et ainsi constater la valeur et l'utilité de l'Esperanto, conserver l'enthousiasme nécessaire pour faire connaître, pratiquer et enseigner la langue internationale.

Nous sommes convaincus de la valeur de l'Esperanto parce que nous l'avons utilisé. Nous sommes énervés et même révoltés de constater que grands médias, décideurs et hommes politiques refusent de tenir compte que l'Esperanto est la meilleure solution au problème de la communication internationale.

Les actions que nous menons devraient être méthodiques, persistantes et diplomates. Ne croyons pas avoir convaincu grand monde parceque nous avons réussi à faire paraître un article dans le journal local si cet article reste sans suite. Evitons aussi une trop grande insistance qui peut provoquer des réactions du genre : "Il nous embête celui-là avec son esperanto !" Evitons les maladresses qui neutralisent nos efforts. Si nous avons la possibilité de tenir un stand ou d'exposer dans une vitrine, ne présentons que des documents, des revues et des livres récents. De vieux livres jaunis et écornés, des tracts anciens, des informations périmées, des brochures éditées ente 1910 et 1930 sont à proscrire absolument. Ne faisons pas de contre-propagande; ne faisons pas passer l'Esperanto pour une vieillerie.

Sous l'impulsion des jeunes de JEF, il existe maintenant une gamme d'articles de publicité bien faits, en couleurs, mis à jour régulièrement : dépliants, brochures, dossiers d'information, panneaux, affiches, autocollants, etc...Recevez gratuitement le catalogue "Promotion - Communication" d'Esperanto - France en le demandant au 01 42 78 68 86 (ou Fax 01 42 78 08 47) ou consultez le sur le site WWW.esperanto-france.org rubrique aktivuloj. Ces documentations peuvent vous être utiles si quelqu'un vous écrit : "J'ai entendu parler de l'Esperanto. Pouvez vous me renseigner ? " Aux documentations, il serait bon de joindre quelques revues de bel aspect. N'ayons pas l'air miséreux!!!

Les clubs qui encaissent des cotisations peuvent commander et régler du matériel de publicité mais comment peut faire un espérantiste isolé qui désire fonder un groupe ? Esperanto-Normandie

peut les aider financièrement et j'invite ceux qui sont intéressés à contacter le trésorier de notre union.

Comment apprendre l'Espéranto ? Voilà une question qui nous est souvent posée. Si le club local organise un cours d'initiation, c'est très bien. Mais l'horaire, le lieu ne conviennent pas à tous. Il faut alors proposer d'autres solutions :

- Cours par correspondance organisés par Esperanto-France (U.F.E.), par SAT-Amikaro et par d'autres associations
- Cours par Internet
- Méthode individuelle : Assimil, cours Rationnel

Il faut ensuite retenir ces élèves. Auront-ils appris l'Espéranto pour rien s'ils ne trouvent pas une structure qui leur permette de pratiquer la langue ?

Dernier point qui sera ma conclusion: n'insistons pas trop sur la facilité de l'Espéranto. Précisons que cette facilité est relative par rapport à l'étude des langues nationales. Pour bien parler notre langue, il faut s'en donner la peine. Quand le cours d'initiation est terminé, il est nécessaire de se perfectionner soi-même en lisant des revues et des livres intéressants, en consultant des dictionnaires (de préférence le PIV), en participant à des stages et à des congrès, en correspondant, en visitant ses amis étrangers, en adhérant aux associations nationales et internationales. Méfions nous de l'anti-propagande des éternels débutants dont la conversation se limite à "Bonan tagon ! Kiel vi fartas? Gis revido !"

Comme toute langue, comme notre langue maternelle, on apprend l'Esperanto pendant toute sa vie. Alors soyons courageux !!!

Petra KJW

NOTRE BULLETIN:

Le Bulletin de Septembre n'est pas paru. En effet, le rédacteur était parti, pour des raisons familiales et touristiques en Californie. D'autre part, peu d'articles lui étaient parvenus. Alors veuillez nous pardonner. Nous vous rappelons que la parution normale est de 4 numéros par an: Fin Mars, Juin, Septembre et Décembre. Le bulletin est adressé gratuitement à des associations amies, à des fédérations régionales en échange de leur propre bulletin. Il est aussi adressé à de nouveaux espérantistes dont les adresses nous sont communiquées par les responsables de groupe. Après quelques envois, il est demandé aux intéressés de payer l'abonnement, s'ils désirent continuer à le recevoir ou bien de nous écrire si le bulletin ne les intéresse pas. Les articles sont les bienvenus en Esperanto (le rédacteur corrigera les erreurs, si nécessaire) ou en français (mais ayant rapport avec l'Esperanto).

ABONNEMENTS-COTISATIONS :

Vous pouvez déjà nous envoyer les cotisations 2002. Adressez de préférence votre chèque à l'adresse du Trésorier (voir l'en-tête) soit en Francs (50) soit en Euros (7,62) . Après le 1er Janvier, obligatoirement en euros. Nous rappelons que Esperanto-Normandie est absolument indépendante des associations nationales : Esperanto-France (UFE), SAT-Amikaro ou autres

ASSEMBLEE GENERALE:

Nous n'avons pas pu organiser l'assemblée générale statutaire annuelle en 2001. Nous attendons une proposition des responsables de groupe ou d'isolés actfs. Il suffit de trouver une salle municipale ou privée et la possibilité de faire un repas en commun (même dans un self!)

Que les volontaires contactent le Président de notre association :

Yves NICOLAS 17 / 37 Quartier du Bois 14200 Hérouville Saint Clair

Il est nécessaire que toute information concernant l'A.G. 2002 paraisse dans le bulletin de Mars

EN NIAJ KLUBOJ:

LE HAVR E : Vi estos bonvenaj partopreni ĉiun trian sabaton de monato kluban kunvenon en Hôtel des Sociétés savantes strato Anatole France. Komencantoj rendevuas ĉiun ĵaŭdon en Salono Cassin por malkovri kaj praktiki Esperanton. Petu informon al Tél. 02 35 43 64 69

"Legi plezure. amiko Kersaudy brave !"

Okaze de manifestacio, "legi plezure", librovendejo La Galerne akceptis ĵaŭdon 18an de Oktobro samideanon Georges Kersaudy. Lŭ ĵus aperigis ĉe eldonejo "Autrement" la verkaĵon "Langues sans Frontière à la découverte des langues de l'Europe".

Dum tiu vesperaĵo, (havraj esperantistoj tie kunvenis) Georges Kersaudy interesigis aŭskultantaron. Almenaŭ okdeko da partoprenintoj malkovris mezeŭropajn kaj orienteŭropajn popolojn, ties lingvon, ties historion .

Post superrigarda prelego, publiko estis invitata pridemandi aŭ argumenti. Respondoj ebligis substreki valoron de Internacia Lingvo :

Iuj landoj havas malfacilan lingvon. Komuniki kun najbaraj nacioj necesigas multlingvecon. Tial, ili jam komprenis intereson de Esperanto kiel helpa komunikilo.

Neesperantistino miris pro multeco da lingvoj en Eŭropo. Ŝi argumentis ke Esperanto estus inda esti instruita unue. Nia amiko tute konsentis kaj analizis la solvojn por interkompreniĝo inter popoloj :

- paroli alilandan lingvon mirigas kaj dubigas enloĝantaron ; ĉu ni estas revenantaj elmigrintoj ?

- paroli anglan lingvon estus katastrofa ĉar tio kaŭzus angligon. Angloparolantoj suferus pro ĵargoniĝo de sia lingvo.

- tria solvo estas adopti Esperanton; tio ebligas komuniki kun Eŭropanoj sed ankaŭ Azianoj

Kiam esperantisto konatiĝas kun samidcano, ŝajnas al ili ke ili estas samvilaĝanoj ; ili uzas saman lingvon ; ili havas saman intereson ; ili estas same scivolemaj.

Dank'al scio de Esperanto, Georges Kersaudy spertis sincerajn rilatojn kun eksterlandanoj kiuj helpis lin praktiki sian lingvon ; same li iniciis ilin al franca lingvo.

Notinda estis la sinteno de aŭskultantaro pri Esperanto : ĉu favora estis la argumentoj , ĉu konsentaj estis la reagoj post klarigo de preleganto?

Niaj klubanoj vere aprezis tiun okazaĵon kaj invitas vin malkovri tiun verkon de Georges Kersaudy

Sylvie CARON

GRAND QUEVILLY (76): La klubo ne estas sendependa sed ĝi estas sekcio de kultura kaj sporta asocio (Amicale Laique). Dum la pasinta jaro, la kunvenoj okazis ĉiusemajne (ĵaŭde vespere); partoprenis regule la kunvenojn 10 personoj. Dum la kunvenoj, ni faras diskutrondojn, ni kantas, ni aŭskultas diskojn kun esperantaj kanzonoj. Por plibonigi nian lingvonivelon, ni tradukas tekstojn. Kiam Normanda Bulteno estas presita, ni kune faldas kaj enmetas en kovertojn la ekzemplerojn por dissendado.

Okaze de vizito de eksterlandanoj, ni invitas ilin partopreni kunvenon kaj prelegi aŭ paroli pri la vivo en sia lando. Ofte, okaze de tiuj vizitoj, ni iras kun nia gasto manĝi kune en restoracio .

Nun, la kunvenoj ne plu okazas regule. Ni kunvenas nur 1 aŭ 2 foje monate.

Pro manko da tempo, ni ne organizas kurson por komencantoj. Pro tio, ne alvenas nova sango en nia klubo. Tio estas domaĝa por estonteco ĉar malnovuloj (mi ne skribas maljunuloj) laciĝas, enuiĝas kaj eble forlasos la grupon .

Petro QUILLAUD

ROUEN: Le groupe libertaire de Rouen est très intéressé par l'Esperanto qu'il considère comme un facteur d'émancipation. Après une importante campagne d'affichage en ville, il a organisé une conférence dans les locaux de la librairie "*L'Insoumise*" rue Saint Hilaire à Rouen. Yves Peyraut, Prezidanto de Plenum Komitato de SAT et animateur de Radio Libertaire a fait un exposé sur l'Esperanto, son histoire et a répondu aux nombreuses questions posées par l'auditoire composé d'environ 25 personnes de tous âges et de tous bords.

Suite à cette réunion qui a permis des échanges d'idées enrichissantes, il a été décidé d'ouvrir un cours d'initiation. Ce cours a lieu un mardi sur deux de 19 h à 21 h dans les locaux de l'Insoumise. L'animatrice est notre amie Catherine Domingo. Il y a 11 élèves de 17 ans à la soixantaine. On peut contacter Catherine au Tél. 02 35 37 41 21 ou pilarica@caramail.com

FECAMP: Mouloud et Taous sont toujours actifs. Le 24 Novembre, ils ont tenu un stand au Salon des Radio-amateurs. Voir suite page 12

LES ANDELYS (27): Les réunions ont lieu le 2ème et le 4ème vendredi de chaque mois. L'animatrice est Sylvie BONNET 10 côte de Noyers 27700 Les Andelys

LANDAJ KAJ INTERNACIAJ INFORMOJ

STAGES D'ETUDE ET DE PERFECTIONNEMENT: organisés par ESPERANTO 44

-Stage à Saint Aignan de Grandlieu au sud de Nantes du 2 au 3 Mars 2002

-Stage en bord de mer à Le Croisic du 18 au 20 Mai 2002

Informations auprès de Hélène Vincent 3 rue Blaise Cendrars 44100 Nantes T.02 40 43 92 42

KONGRESOJ LANDAJ KAJ INTERNACIAJ:

SAT -AMIKARO kongresos en vilaĝo VIGY (Moselle) de la 30a de Marto ĝis 2a de Aprilo (Pasko). La kongreso estos organizata de klubo Esperanto-Thionville. Informoj pri la kongreso estas haveblaj sub la jena poŝta adreso : Bruno Henry 5 rue Jean Mermoz 57100 Thionville
Tél. 03 82 54 32 91 aŭ esperanto.thionville@laposte.net

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA :kongresos en ALICANTE (Hispanio) de la 1a ĝis la 8a de Julio Petu informon kaj aliĝilon ĉe SAT 67 Avenue Gambetta 75020 Paris T.0147 97 87 05
satesper@noos.fr

87e MONDIAL D'ESPERANTO du 3 au 10 Août 2002 à Fortaleza au Brésil

Les services d'Esperanto-France proposent un voyage engroupe

Nous avons obtenu une idée de prix, encore sans engagement définitif. Aller-Retour Paris-Fortaleza-Paris (par Sao-Paulo) Départ 1er Août, retour 12 Août reviendrait entre 1680 et 1750 Eur. pour la partie congrès (hôtellerie, petits déjeuners et voyages). Le même voyage plus 5 journées à travers le Brésil (retour Paris le 17 Août) avec Rio de Janeiro et Ignacu reviendrait au total entre 2800 et 2950 Eur. (tous les repas sont inclus dans cette partie)

Contactez Esperanto-France 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris T.01 42 78 68 86

SAT-Amikaro change de rive: Installée depuis plus de 60 ans dans le 20ème Arr. de Paris, SAT-Amikaro planifie l'aménagement d'un nouveau siège non loin de la Place d'Italie et de la Grande Bibliothèque

La nécessité d'un espace plus vaste et plus convenable pour les réunions, les cours et les stages et pour l'accueil des visiteurs a conduit l'association à rechercher des locaux adaptés à ses besoins afin de mieux satisfaire la demande. Afin d'accélérer l'aménagement du siège et de couvrir les frais importants d'équipement SAT Amikaro a ouvert un fonds spécial destiné aux dons. Les chèques sont à libeller à l'ordre de SAT Amikaro CCP : La Source 37 852 90 L Mentionner comme objet du versement "Fonduso por la nova lokalo"

L'association mondiale SAT restera avenue Gambetta. Ne pas confondre les 2 associations: SAT utilise l'Esperanto pour propager ses idées. SAT Amikaro fait connaître et enseigne l'Esperanto

COTISATIONS NATIONALES & INTERNATIONALES

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (UEA):

avec le Jarlibro et l'abonnement à la revue Esperanto 50 Eur.

sans la revue: 20

ESPERANTO-FRANCE (UFE):

avec la revue "Le monde de l'Esperanto" et le bulletin "Okazas" 52

sans la revue: 30

ESPERANTO-JEUNES (JEFO)

avec les revues Jeunesperanto-info (France) & Koncize (Europe) 30

Tarif réduit por étudiants, scolaires, chômeurs 15

Association Mondiale pour jeunes espérantophones (TEJO)

avec les revues Kontakto & Tejo tutmonde et le Jarlibro 20

Les cotisations pour ces 4 associations sont à régler à Esperanto-France, 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris CCP 855 35 D Paris. De préférence, demandez à U F E le bulletin d'adhésion ou de renouvellement à joindre à votre chèque.

+++++

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (SAT):

avec jarlibro & mensuel "Sennaciulo" & Sennacieca Revuo (annuel) 48

Cotisation à régler à : SAT Peranto CCP 17333 10 N Paris Envoyez votre chèque à Pierre Quillaud 16 rue Lt Vaisseau Paris 76120 Grand Quevilly

SAT AMIKARO:

avec revue SAT-Amikaro 31

Cotisation à régler à SAT-Amikaro CCP 37 852 90 L La Source. Envoyez votre chèque à SAT-Amikaro 67 avenue Gambetta 75020 Paris

Je n'ai pas d'information concernant les cotisations de Franca Katolika Esperanto Asocio, de l'association des cheminots, de la Fédération Espérantiste du Travail A paraître dans le prochain bulletin.

ABONOJ por 2002

Heroldo de Esperanto (12 numeroj) 30 Euroj

Literatura Foiro 28

Eventoj (23 numeroj) 34

Monato (monata magazino) 39

Fonto (literatura revuo) 35

La Ondo de Esperanto (Rusio) 12 numeroj 24

Rok'Gazet (muziko) 15

La Domo (revuo de profesioj kaj servoj) 4 numeroj 19

Vi povas aboni tiujn revuojn ... kaj aliajn pere de Esperanto-France 4bis r.Cerisaie 75004 Paris

Esperanto-Info (Bulletin d'information sur la langue internationale) 7,62

Chèque à l'ordre de Esperanto-info CCP 11 901 46 B Marseille à envoyer à : Esperanto-Info

Saint Simon 82130 Lafrançaise

Laŭte (dumonata liberesprimilo) 14

Chèque à l'ordre de Cercle Amical Espérantiste CCP 3371 74 M Bordeaux à envoyer à Esperanto 47470 Beauville

Anne-Marie LEPREVOST qui habite à Flers (Orne-61) a participé à son premier congrès international et elle nous confie ci-dessous ses impressions:

La 74a Kongreso de SAT sub nesperta rigardo Mia unua internacia kongreso en Nagykanizsa (Hungario)

Sabate 14an de Julio, en la Kultura Domo (Hevesi Sándor Művelődési Központ) la hungaraj geamikoj akceptis la multajn gekongresanojn : 176 el 27 landoj de la 5 kontinentoj) Personaj malagrablejoj Eŭraj bankĉekoj ne estis akceptataj kvankam kost-tabeloj de mendilo estis en eŭroj kaj mi ne kunportis francajn frankojn. Feliĉe, bank-mon-aŭtomato staris proksime kaj mi povis akiri monon per mia kreditkarto. Alia malagrablejo : loĝado estis iom pli kosta ol anoncote sed ridetaj vizaĝoj de la organizintoj treege helpis min en tiu malagrableta momento . Mi dankegis niajn akceptantojn kaj precipe nian hotelgvidintinon kiu estis kvazaŭ“ŝafgardistino” kun la eksterlandanoj, semajnkomence.

Praktikega estis la antaŭa disdono de ĉiuj restoraciaj kuponoj. Du “superriĉaj” manĝadoj tagmeze kaj vespere okazis en la 2 kel-restoracioj “Nelson Pub” kaj “Robinson Pizzeria”. Fakte, unu estus sufiĉinta post la “granda” matenmanĝo en la Touring Hotel !!! La hotel administristo iomete parolas esperant- kaj franc-lingve; li rakontis al ni pri la jara vizito de gimnazianoj el tekniklernejo de Nantes-regiono kiujn regule akceptas “Touring Hotel”.

Neniun malproksiman ekskurson mi partoprenis (duontaga rondvojaĝo ĉirkaŭ Balaton lago kun hungara kamparana nuptofesto , -tutaga vizito de ĉefurbo Budapeŝt, - duontaga vizito de Keszthely).

Dimanĉe 15a de Julio, okazis la oficiala malfermo de la 74a kongreso de SAT. Posttagmeze, ni promenis en la urbo kaj vizitis la lokan muzeon: Bèla tradukis la klarigojn de la gvidisto. Agrable malvarma estis la fontanakvo apud la preĝejo ...dum tiu varmega piedpromenado ! Post kelkaj “esperantaj “horoj, mi” kaptumiĝis” ... do mi izoliĝis iomete. Vespere, agrabla surprizo !: Eksterordinara retrovo kun 3 geamikoj ekkonitaj en Grésillon dum somero 1995: Pitovia Irena kaj du gefrancoj Janine kaj Christian... neantaŭvidita ĝuo ! Anjo kantis... mia koro ankaŭ !

Lundel6a, matene, ni iris en meblofabrikon “Kanisza Trend”: malfacilega laboro en la somera varmego, gluvaporoj, ledtranĉado en akvavaporo, bruado de stebmaŝinoj... La fabriko vendas belajn salonojn. Marde 17a, nia aŭtobuso kondukis nin al Söjtör kie estas iu elektra eks-transformatoro kiu iom post iom fariĝas Esperanta Domego :Humana Eŭropa Asocio (Deak F.u2 8897 Söjtör , Hongrie) (plu@pro.hu) deziras ricevi eŭropajn esperantajn informojn. Ni kuntrinkis bongustajn lokajn vinojn.Merkrede 18a, mi kunveturis al naskiĝurbo de la patro de mia kunulo: Czigetvár kun detruita turka kastelo de” Soliman la belega”. Tie ni vidis cikoniojn en siaj nestoj. Ĵaŭde kaj vendrede, mi partoprenis la laborkunsidojn (Mia esperanta apetito kvietigis mian kaptumiĝon...) Mi ŝatis la grandajn diversajn kontraŭajn parolbatalojn ! Mia nesperto malhelpis min multaj vortoj mankis por eldiri miajn ideojn. Plurajn aliajn kongresojn mi bezonos partopreni ! Dum 2002 , Alicante (Hispanio) akceptos la 75an SAT kongreson. Bedaŭrinde, tiam mi laboros ĉar estos la liceaj ekzamenaj semajnoj

Konklude, mi skribu ke mi ŝatis la diversajn kulturvesperojn (muziko, kantoj, teatro, poezio, danco...) kaj kelkajn prelegojn (Heroldo, fronte al la nuna tutmondiĝo, simbolismo de rusa pentrado, verdaj esperantistoj...

Homriĉa semajno ! Neforgesinda!

Tiu unua sed nelasta kongreso

Ĝis revido!

Anne-Marie LEPREVOST

BICIKLA ARANĜO EN ĈEHIO. EN GASTEMA ETOSO

Dobrichovice, Doksy, Bezdez, ankaŭ Ibire signifas nenio por multaj inter vi. Tamen, se mi aldonas la nomon Prago, vi tuj komprenas ke temas pri Ĉeĥio.

I.B.I.R.E : Internacia Bcikla Renkontiĝo, baldaŭ ne plu estos ignorebla de la ŝatantoj de biciklado kaj de Esperanto ; ĝi tre certe fariĝos bela tradicio.

Petro Chrdle, Miloš Bloudek, Renata Mauresova organizis dum unu semajno en septembro 2001 la unuan IBIRE. Dek-kvin fervoraj kaj diversnivelaj biciklantoj renkontiĝis en la eksvulkana regiono ĉirkaŭ Doksy kiu estas turisma urbeto, norde de Prago, apud la fama Bezdez kastelo.

Tiu regiono taŭgas por ĉiuj : vulkanaj montetoj, lagoj, arbaroj, rokoj, klifoj kaj multaj ĉeĥaj kabanaj kaj tradiciaj domoj . Kun malmulte da aŭtomobiloj !

La afero okazas en tre agrabla kaj simpla etoso. Homoj venintaj de Ĉeĥio, Slovakio, Germanio kaj Francio (kvar membroj de la klubo de Hérouville) tre bone rilatis inter si, tuttage rajdante biciklojn aŭ babilante vespere dum esperantaj kunvenoj ĉirkaŭ glaso da loka bongusta biero ("pivo").

Por kelkaj, okazis antaŭaranĝo en Dobrichovice kie loĝas Petro kaj unutaga vizito de Prago.

Tiu unua I.B.I.R.E estis tre bone organizita, la bicikloj surloke luitaj bonkvalitis kaj mi senrezerve invitas vin partopreni la aranĝon okazontan en Septembro 2002.

Patrick ETIENNE

Groupe d'Hérouville (14)

(por pliaj informoj, sin turni al : Petro CHRDLÉ : Anglicka 878, -252 29 Dobrichovice Ĉeĥio
<chrdle@kava-pech.cz>

KVINAJ RENKONTIĜOJ EN PLOUEZEC

Somere, okazis la kvinaj "Pluezekaj Renkontiĝoj" en Bretonio, de la 18a ĝis la 24a de Aŭgusto 2001. Cent sesdek homoj el dek-ses landoj partoprenis ilin. La organizintoj estis kontentegaj. ili eĉ devis rifuzi plurajn enskribiĝojn.

La programo estis riĉa. Ĉiutage, dum 3 horoj, kursoj estis proponataj en la loka lernejo laŭ diversaj niveloj. Poste, pluraj aktivaĵoj estis eblaj ; kursoj por instruantoj, joko, interreto, kantkorusoj, teatro ktp...kaj turismaj vizitoj al vidindaj lokoj kiel La Roche Jagu, abatejoj, muelejoj, temploj, muzeoj, klifoj, ostraj parkoj eĉ skulptaĵoj produktitaj de organizkomitatano.

La granda komuna ĉambro, ornamita per infandesignaĵoj, estis uzata por diversaj aktivaĵoj, manĝaĵoj kaj receptoj.

La programo de distraj vesperoj konsistis el : bretonaj dancoj, prelegoj pri reduktitaj modeloj, pri ĝardenoj, pri la urbo Gorazde en Bosnio (kun ekspozicio) interŝanĝoj de ideoj pri Raymond Schwartz, granda verkisto kaj humoristo, lumbildoj pri bretona kulturo, interreto kun Paimpol-klubo, kantoj de bretonaj maristoj, bulgaraj kaj germanaj kantoj, spektakloj kun skeĉoj, ĵongladoj, ktp...

Ĉiam pli kaj pli forta granda ... Regule, la nombro kaj la kvalito progresas. Ĉiujare, proksimume dudek procentoj revenas, diris ĉeforganizanto, Roger Eon.

Mi diras : daŭrigu ! vi estas sur la bona vojo ! Dankon !

Dominique LEROY

Grupo de Grand Quevilly

D'autres Normands ont participé au stage de Plouezec. Certains plusieurs fois. Mais le nombre de participants a atteint son maximum. Pour beaucoup, ces rencontres sont plus plaisantes qu'un congrès. Pensons aussi aux stages proposés à Grésillon et à Boursesse.

IMPRESOJ PRI VOJAĜO EN OKCIDENTA USONO

Naskiĝo de nepino, meze de Aŭgusto 2001, instigis mian edzinon kaj min viziti niajn filon kaj bofilinon kiuj laboras en Kalifornio (Silicon valley) de pli ol 3 jaroj. Antaŭ atingi ilin, ni deziris profiti la okazon por turismi kaj ni uzis la servon de turisma agentejo Air -Transat.

Ni ekvojaĝis sentime la 22an de Septembro malgraŭ la atencoj okazintaj en Nov-Jorko, 11 tagojn antaŭe.

La unua etapo de nia vojaĝo estis Phoenix en Arizona; tiu urbo estas proksima de Meksikio. Do regis varma temperaturo. Nia grupo konsistis el nur 24 gevojaĝantoj kun kiuj ni simpatie rilatis.

Ni spektis mirinde belegajn pejzaĝojn en grandaj naciaj parkoj. La 1an tagon, ni ekskursis al **Monument Valley**, meze de plej famaj naturaj dekoroj de Western filmoj. Ni tie manĝis ĉe indiajnoj "Navaĵos". En programo de nia vojaĝo estis kompreneble la vizito al **"Grand Canyon"**, profunda 1500 metrojn; en la fundo fluas de pli ol 5 milionoj da jaroj la rivero Colorado. Nenia foto povas "kapti" la vidaĵon kiun oni havas propr-okule, starante ie ajn ĉe bordo de tiu longa fendego.

Tamen pli belega ol Grand Canyon aspektis al ni **"Bryce Canyon"**. Tie erodo skulptis ne-nekredeblajn altajn ŝtonajn turojn kun eksterordinaraj koloroj. **Sulago Powell**, ni ŝipekskursis admirante pejzaĝojn el ruĝaj rokoj kontrastantaj kun bluaj akvoj.

Post vizito de Zion, ni atingis **"Death Valley"** (Mort-valo), tielnomitan pro multaj pioniroj kiuj tie mortis pro soifo kaj varmeco. Estas plej malalta loko de nia planedo : 85 metroj sub marnivelo. Tie estis maro antaŭ pluraj miloj da jaroj. Tiu valo estas ĉirkaŭata de dezertaj montaroj. Meza temperaturo en julio estas 47 gradoj ĉe ombro. Post kelkaj minutoj, ni do plezure eniris nian buson kun klimatizita aero.

Nacia Parko Yosemite : ĝi estas fama pro majesteco de ties pejzaĝoj, imponaj akvofaloj kaj arbaroj. Ni estis tre malgrandaj starante ĉe piedoj de gigantaj sekoj ; kelkaj estas 150 m altaj. Ili estas tiel larĝaj ke veturilo povas trairi iliajn trunkojn.

Aliaj vidindaĵoj : alproksimiĝante al San Francisko, kaj laŭlonge de Pacifika Oceano : la preskaŭinsulo **Monterey**. Tie Oceano estas tre moviĝema kaj ondoj atakas rifojn. Marakvo estas malvarma pro polusaj fluoj. Tie, ni vidis fokojn, marelefantojn...

Urboj kaj vilaĝoj : Vilaĝoj ne estas belaj : senstilaj domoj estas dissemataj en rektaj stratoj.

Las Vegas : urbo de kazinoj. Ni tie dormis ĉe 18a etaĝo de hotelo ; tiu hotelo havas 4000 dormĉambrojn. Ĉe teretaĝo, pluraj miloj da monermaŝinoj estis uzitaj de homoj kiuj esperis gajni multe da mono. Kaj estis multe da tiaj kazinoj ! Freneze !!! Plej interesaj estas, dumnokte, la surstrataj lum-spektakloj. : Imagu ke ni retrovis tie Triumfarkon kaj Efelturon (je skalo 1/3).

Los Angeles : Grandega urbego tre poluciata pro aŭtomobiltrafiko kaj sen turisma valoro. Ni precipe rigardis ĉirkaŭaĵojn kies nomoj estas elvokaj por tiuj kiuj ŝatas usonajn televidseriojn : Sankta Monika, Beverly Hills, Hollywood kie ni vizitis "Universal Studios".

San Francisko : ĝi estas la plej bela urbo de nia vojaĝo. Ĝi situas inter Oceano kaj la bajo (baie) Famaj estas ĝiaj pontoj : Bay Bridge kaj Golden Gate Bridge. Ĉiuj turistoj vizitas kvartalon kun belaj Viktoriaj domoj. Ni vespermanĝis en ĉina restoracio en Chinatown. Ĉinoj, Japanoj kaj aliaj Azianoj estas tre multaj en San Francisko. Ni amuze promenis en "cable car", tiuj malnovaj pitoreskaj tramoj tirataj per kablo kiu "kuras en relo sub ŝoseo". Tre impresa estas la forta deklivo dum tramveturado.

RIMARKOJ :

Eventoj en Novjorko : Ĉiuj Usonanoj estis tre impresitaj. Ilia konfuzo okazigis elmontron de patriot-religiaj sentoj. Ĉe fenestroj de multaj domoj, sur aŭtomobiloj flirtis naciaj flagoj. Estis grandaj lumaj afiŝoj kun frazo de Prezidento Bush : "God Bless America" (Dio Benu Amerikon) Ni ne havis multajn kontaktojn kun enloĝantoj pro manko da tempo kaj pro lingvaj malfacilaĵoj. Kvankam mi restudis anglan lingvon antaŭ ekvojaĝo, mi sukcesis legi sed ne komprenis respondojn al miaj demandoj.

VOJAĜO AL USONO (Sekvo)

La urboj estas tre puraj ; ni ne vidis skribaĉojn sur muroj. (Mi atentigas vin ke temas pri Kalifornio sed ne pri tuta Usono ; mi ja aŭdis ke Nov ĵorko estas tre malpura) Mi vidis kelkajn homojn kiuj promenigis hundojn ; sed ne ekzistas hundo - manio kiel en Francio ; do, ni povis marŝi ne ĉiam atentante pri hundofekaĵoj. Estas multaj tualetejoj senpagaj sed puraj kvankam ne deĵoras gardisto. En restoracioj kaj kafejoj, al fiksita prezo necesas kalkuli kaj aldoni taksojn kaj servokostojn. Nia juna Usona gvidisto ne nur prikomentis pejzaĝojn ; li ankaŭ donis sian propran opinion pri vivo en sia lando : "Okaze de malsano, kuracado kaj restado en hospitalo multekostas kaj privataj asekuroj repagas malmulte. Necesas ŝpari monon por senlaboreco kaj por maljuneco ĉar pensioj estas tre malaltaj . Vi Francoj plendas pro tro altaj impostoj sed mi ŝatus pagi tiom da impostoj kiom vi kaj malpli pagi al diversaj instancoj. Imagu ke en kelkaj ŝtatoj, necesas pagi policon se oni alvokas ĝin."

San Francisco estis la fino de nia turisma vojaĝo. Revenis al Francio la membroj de nia grupo. Mia edzino kaj mi restadis unu plian semajnon ĉe niaj familianoj. La flugado de San Francisco al Parizo daŭris 13 horojn. La hordiferenco estas 9 horoj.

Kaj Esperanto ? Mi kunportis jarlibron esperante kontakti amerikajn samideanojn sed mi ne organizis nian vojaĝon pere de ĝi... Dum la 2 unuaj semajnoj, la programo de vizitoj estis plenplena. Ni devis ellitiĝi frue ĉar ni devis longe veturi kaj ni atingis hotelon vespere malfrue tre interesitaj sed lacaj dezirante manĝi kaj dormi . Do mankis tempo por kontaktoj.

Kiam mi estis ĉe nia filo, mi esperis ĉeesti la monatan kunvenon de San-Franciska klubo. Sed la loĝejo de mia filo situis 50 kilometrojn sude de S.F. kaj mi ne disponis veturilon Domage ĉar la tieaj esperantistoj estas tre aktivaj !

Petro KIJO

TURKA POEMO

Nia amikino Dominique Corrieu el Berneval le Grand (76) apud Dieppe tradukis esperanten la jenan turkan poemon :

"Kız çocuğu" el Nazım Hikmet (turka teksto)

Kapıları çalan benim
kapıları birer birer.
Gözünüze görünemem
göze görünmez ölümler.

Hirosima'da öleli
oluyor bir on yıl kadar.
Yedi yaşında bir kızım,
büyümez ölü çocuklar.

Saclarım tutuştu önce,
gozlerim yandı kavruldu.
Bir avuç kül oluverdim,
külüm havaya savruldu.

Benim sizden kendim için
hiçbir şey istediğim yok.
Seker bile yiyemez ki
kağolt gibi yanan çocuk.

çalıyorum kapınızı
teyze, amca, bir imza ver.
çocuklar öldürülmesin
Seker de yiyebilsinler

La knabineto

Estas mi kiu frapas al la pordoj
Ĉiuj la pordoj unu post unu
Viaj okuloj ne povas vidi min
Mortintoj estas nevideblaj

Antaŭ mia morto en Hiroshima
Jam de dek jaroj
Mi estas sep jara knabino
Mortintaj infanoj ne kreskas

Unue miaj haroj enflamiĝis
Miaj okuloj bruldoloris
Kaj mi plu estas nenio krom cindroj
Cindroj disĵetitaj en aeroj

Mi neniun petas por mi
Knabino kiu brulis kiel papero
Ne plu manĝas
eĉ sukeraĵojn

Kaj mi frapas al viaj pordoj
petanta vian subskribon
Por ke la infanoj kiujn oni ne plu murdas
povas ankoraŭ manĝi sukeraĵojn

LEGADO EN ISTRIO

Rovinjo en Istrio, eks-itala posedaĵo, estas ĉarma kaj mirinda urbeto en Okcidenta Kroatio kiun ni familie ĝuis dum monatuono, en julio. Kvarope vojaĝi aŭte, dum 1800 kmj, trudis al ni la elekton de malgrandaj kaj malpezaj pakaĵoj. Pro tio, mi elbretigis nur platajn librojn en la franca kaj esperanta lingvoj. Kvankam rapide kaj prekaŭ hazarde elektitaj miaj legaĵoj, senescepte, ege plaĉis al mi.

Samideanino de Carpiquet, Madeleine Guionie, afable pruntedonis al mi "Mia Malagar" far Lucienne Sinzelle kies familio plurjare laboris en la tiel nomata bieno de François Mauriac, apud Bordojo. Necesus pli ol kelkaj frazoj por inde raporti pri tiu emociplena verko de virino kruele vundita en sia seksa vivo pro patra fiago. Ŝi skribis ankaŭ belajn paĝojn pri Jean Mauriac, sublimigita kaj sekreta amo kiu helpis ŝin dum la tuta vivo. Pri François Mauriac mem, oni same multe informiĝas : tiu burĝo, forte kritikema kontraŭ sia klaso, ne konsciis aŭ ne priatentis la mizerajn vivkondiĉojn de siaj propraj dungitoj.

"Mon Malagar", Lucienne Sinzelle, Gallimard, 133 paĝoj, 2001 (franclingve)

Kvazaŭ samteme kaj ŝlosildone, instruplena libreto far Michel Pinçon kaj Monique Pinçon Charlot pri la burĝa klaso. Tiun "Sociologio pri la burĝaro" nepre legu tiuj kiuj tro rapide kredis ke la klasbatalo eksmodiĝis (ili ankaŭ spektu la filmon "Sociologio estas sportlukto" far Pierre Carles pri Pierre Bourdieu) Probable multlingve tradukote, tiu centpaĝa libro meritis tradukon en Esperanton por nia movado ne tiel neŭtrala kiel oni kutime asertas....

"Sociologie de la bourgeoisie", M. Pinçon, Mon. Pinçon-Charlot, La Découverte, 113 p (fr. lingve)

"Tiu Toskana Septembro" estas krimromano, kiun verkis Corrado Tavanti kaj Istvan Erti, nuna redaktoro de "Esperanto". Tre certe la krimromanoj estas plej ofte legataj dum la someraj ferioj. Krimoj kaj misteroj plej allogas nin dum trankvila sunumado kaj freŝbiera trinkado. Ju pli da persekutoj, des pli da bonaj siestoj ! La aŭtoroj respektis la regulojn de tiaj verkoj : nekonata murdisto, mortinto nekomplete senkulpa, suspektindaj aĉuloj, amindaj belulinoj, falsaj supozoj kaj solvo divenebla nur je la lasta linio de la lasta ĉapitro post kaptoplenaj eventoj. La somera suno jam estas for, sed tiu facila romano ankaŭ legindas ĉe la kameno, dum niaj longaj vintraj vesperoj, kiam vento muĝas kaj senfoliaj arboj disĵetas homajn kaj minacajn formojn. Aaaah....
"Tiu Toskana Septembro", Corrado Tavanti, Istvan Erti. Hungara Esperanto Asocio 136 paĝoj 1990, (esperantlingve)

Ankaŭ la libro de Lena Karpunina estas verkita en facila kaj bela Esperanto ; tamen mi konsilas ĝin legi, iom post iom, por ke "La Bato" ne estu tro forta . Tiu juna virino, nun loĝanta en Berlino vivis sian junaĝon en Sovetunio, ĉefe en Taĝikio. De tiuj jaroj, ŝi raportis novelojn kie regas perforta etoso kun homoj sub influo de senindulga sistemo. Tie, oni mortpafis infanojn, oni ĝismorte persekutis fuĝintojn ; tie homoj dronis en alkoholo kun dramaj konsekvencoj por ĉiuj proksimuloj. Se ŝi ne belstile verkus , mi tuj fermus la libron ĉar ĉio estus tro rapide ne eltenebla. Sed la ritmo ensorĉigas nin , kiel en "Récits de la Kolyma" de Šalamov, bedaŭrinde ne troveblaj en Esperanto. Pluraj noveloj, feliĉe, rilatas al pli serenaj spertoj, kelkfoje eĉ amuzaj ("La Motorciklo"). Nepre legu tiun pri tramonda marŝado ("En la montaro") en kiu ŝi konfesas sian amon al Taĝikio. Espereble, tiu verko estos la unua de longa listo !

"La Bato", Lina Karpunina, Flandra Esperanto Ligo 125 paĝoj 2000 (esperantlingve)

"Kolyma" 1, 326 paĝoj, kaj 2, 380 paĝoj 1980, de Varlam Chalamov

éd. François Maspéro (franclingve)

Yves NICOLAS

Lisez en Esperanto !!! Si vous êtes membre d'UEA, vous avez reçu la "esperanto-katalogo de libroservo de UEA" Sinon, demandez les catalogues plus réduits de Esperanto-France et de SAS-Amikaro.

Nia amiko Henri Rousseau sendis al ni jenajn "Piajn Anekdotojn" petante min ne aperigi ilin se mi opinias ke ili povus ofendi helkajn. Dio-kredantoj, bonvolu sciigi al mi vian bedaŭron aŭ vian rideton.

Nia Sinjoro Jesuo Kristo golfoludas. Li frapas la pilkon per sia klabo. La pilko alten suprenleviĝas; kiam ĝi estas refalonta, falko ekprenas ĝin per siaj krifoj, flugas ĝis super la truon, kaj ellasas la pilkon, kiu post ioma surtera ruliĝo, estas haltonta je kvin metroj de la truon; sed kuniketo saltas al ĝi, ĝin prenas en la antaŭaj kruroj kaj ĝin enŝovas en la truon. Tiam NS.JK. ĉielen levante la okulojn diras :

"Paĉjo, mi petas, min lasu ludi !

Sur vojeto de Afrika ĝangalo, misiisto piediras sola. Subite, ĉe vojturno, li frontalfrontas leonon ! Videble la animalo malsategas. La misiisto sentas sin perditan kaj lanĉas al la ĉielo fervoran preĝon - Dio ĉiopova ! Inspiru kristanajn sentojn al tiu bestio* ! Kal la miraklo efektiviĝas : la leono surgenuiĝas, kunigas la antaŭajn krurojn, kaj diras :

- Sinjoro Dio, benu tiun manĝon !

* "Bestio" Tio ne estas tajp-eraro. Vidu en PIV la diferencon inter Best/o, Besti/o, kaj Animal/o. Bestio estas "Sovaĝbesto" kaj "Sovaĝinstinkta senbride perfortema homo" (La Red.)

TUTMONDAJ PROVERBOJ

Kiam falas arbo, la en ĝi vivanta birdo mortas (Afriko)

Sperto estas lanterno alkroĉita sur la dorso : ĝi lumigas la jam iritan vojon (ĉina)

Lasu bruli kion ne kuirigas por vi (rusa)

Al hundo kiu havas monon, oni diras : "Sinjoro hundo" (araba)

La kato kiu metas gantojn maltrafos la muson (angla)

Henri ROUSSEAU

UN PEU D'HUMOUR

Un Suisse cherchant son chemin arrive à un arrêt de bus où deux Anglais sont en train d'attendre:

-Entschuldigung, können sie deutsch sprechen?

Les deux Anglais restent sans réaction.

-Excusez moi, parlez vous français ?

Aucun effet.

-Parla italiano ?

Pas de réponse.

-Hablan ustedes español ?

Toujours rien . Le Suisse les quitte très déçu. L'un des Anglais se tourne vers son compatriote et lui dit :

- Tu sais, on devrait apprendre une langue étrangère.

- Pour quoi faire ? fait l'autre, ce type en connaissait quatre et cela ne lui a servi à rien !

Extrait de la revue "Esperanto - info"
Transmis par Gérard Fleuter

EXPOSITION DES RADIO-AMATEURS À FÉCAMP LE 25/11/2001

Extrait du compte-rendu de Mouloud Touileb:

Depuis 1996, les associations de radio-amateurs qui exposent leur matériel invitent l'Espéranto. Jeanine Lesueur et Mouloud Touileb étaient présents à ce rendez vous pour marquer la présence et la continuité de la langue internationale. Quelques mots ont été échangés en présence des élus locaux, dont Monsieur Jeanne, maire de Fécamp et député "Combien d'espérantophones à Fécamp ?" Telle fut la première question. "Est-ce que ça marche ?" Nous sommes cinq : Yves Gilbert, Pascal, Jeanine, Taous et Mouloud. Des cours vont reprendre début janvier 2002, grâce à Taous dans les locaux d'Artisans du Monde. Monsieur le Maire a apprécié cette initiative qui correspond aussi à la vocation d'ouverture de cette association de solidarité avec les peuples du Tiers-Monde. D'ailleurs Pascale, espérantiste du groupe de Fécamp anime officiellement depuis quelques semaines la boutique et le centre de documentation d'Artisans du monde. Par ailleurs, d'autres personnes du Système d'Echanges Local (Le SEL de Caux) ont reçu une petite information sur l'Esperanto. Au sein du SEL, Taous offre son cours en échange de bulots !

Malgré la concurrence de la fête du hareng qui avait lieu le même jour, nous avons reçu à notre stand une dizaine de personnes qui ont posé des questions et sont repartis avec une fiche de documentation U.F.E. : notamment un jeune homme de Vire, un radio-amateur du Havre qui devra prendre contact avec le groupe du Havre, Marie-Claude H. de Bolbec qui souhaite se perfectionner, Monsieur Cristini, qui défend la cause des dons d'organes ; ce monsieur avait connu l'Esperanto dans son enfance ; son grand-père membre de la colonie russe à Nice avait été l'ami Zamenhof.

La presse locale s'est fait l'écho de la manifestation. Extrait du journal de Fécamp : *Parmi les nombreux stands qui agrémentaient cette exposition-salon, on remarquait...un stand du club espérantiste (l'Espéranto, langue internationale, est utilisée de par le monde entier par les amateurs radios et le club donne des cours très régulièrement à Fécamp)*

Mouloud TOUILEB

Vi finlegis nian bultenon. Ĝi enhavas pli da paĝoj ol kutime sed tio kompensas parte la Septembran numeron kiu ne aperis.

Mi nun resumas kion atendas nia asocio de ties membroj .

- La Redaktoro jam petas artikolojn, informojn, komunikojn por la Marta Numero
- La Kasisto petas vian abonkotizon por jaro 2002
- La Prezidanto atendas vian proponon por organizi Ĝeneralan Kunvenon

Subtenu naciajn kaj internaciajn asociojn kiuj bezonas multajn membrojn por esti pli fortaj
Abonu revuojn. Legu librojn Partoprenu kongresojn kaj staĝojn

Kaj nun, ni esperas por vi kaj por viaj familianoj

Ĝojajn Kristnaskajn kaj finjarajn festojn !



Bonan Novan Jaron 2002 !